



TEA-BULTENO

6^A JARO

MAJO - JUNIO 2003

NUMEROJ 5-6

Renovigita vivo ĉe TEA

Sabaton la 12^{an} de aprilo okazis la inaŭguro de la nova sidejo de nia Asocio. En ĉeesto de ĉirkaŭ 60 personoj, tre solene nia rumena amikino Afrodita Cionchin el Timișoara tondis la verdan rubandon, firme tenitan de du TEA-aninoj antaŭ la enirejo: ĉion ĉi sekvis la beno de la ejoj fare de pastro Hammer. Partoprenis en nia festa evento ne nur triestanoj sed ankaŭ geamikoj venintaj el Rijeka, Trento kaj Udine.

La prezidanto Edvige Ackermann, en sia malferma parolado, menciis la diversajn vole-nevolajn translokigojn de TEA dum ĝia preskaŭ centjara ekzisto kaj aparte akcentis ke la nuna situo, urbocentra kaj en prestiĝa domo, prezentiĝas kiel bonega oportuno por estonta pli vigla aktivado.

Estis legitaj la bondezirsalutoj de la UEA-prezidanto Renato Corsetti, de Kroata kaj Slovena Esperanto-Ligoj, kaj de aliaj unuopuloj. Krome oni legis parton de la

PROGRAMO EN TEA - MAJO

02 - vendredo	h. 20.00 - Kartludado
06 - mardo	h. 20.00 - Preparlaboroj por interna Seminario pri interpretado
07 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
08 - ĵaŭdo	h. 17.00 - Kurso de Esperanto
09 - vendredo	h. 20.00 - Impresoj pri Universala Kongreso (videofilmo) - 1-hora daŭro
13 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
14 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
15 - ĵaŭdo	h. 17.00 - Kurso de Esperanto
16 - vendredo	h. 20.00 - Prelego itallingva de prof. Rosalba Trevisani: "Conoscerci e conoscersi"
20 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
21 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
22 - ĵaŭdo	h. 17.00 - Kurso de Esperanto
23 - vendredo	h. 20.00 - Vojaĝante kun Anita (diapozitivaj)
27 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
28 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
29 - ĵaŭdo	h. 17.00 - Kurso de Esperanto
30 - vendredo	h. 20.00 - Seminario pri interpretado

raporto, farita kaj prezentita dum la Jarasembleo en januaro 1947 de malnova membro, s-ro Guido Stefaneli, en kiu li priskribas la cirkonstancojn sekve de kiuj okazis la restarigo de nia asocio, post la 2^a mondmilito. Tiam la nova sidejo estis inaŭgurita la 2^{an} de majo 1946, ĉeeste de novaj kaj malnovaj membroj, per parolado de la ĵus elektitaj prezidanto d-ro Polidoro Polidori kaj vicprezidanto d-ro Bruno Marini.

Entute estis sukcesa kaj ĉefe promesoplena tago, kiu plifortigas en ni ĉiuj la fidan senton je pli brila estonteco por nia lingvo kaj nia asocio.

Dum tiu sabato estis prezentitaj ankaŭ la programoj de maja kaj junia monatoj, kiujn tutcerte ankaŭ VI emos partopreni. Ni certas, ke inter la diversaj eroj vi trovos almenaŭ unu kiu estas interesa por vi!

En majo oni komencos fari seriozajn esploradojn en TEA-arkivo, por pristudi la dokumentaron, prepare al la celebrado de la 100-jariĝo de Triesta Esperanto-Asocio, okazonta en aprilo 2006. Por tiuj kiuj ŝatas kanti, ĉiun merkredon kunvenas kantemuloj majstre kaj estre gvidataj de Devana. Unufoje monate oni klopodos instrui kaj memlerni efikan metodikon por sinsekva interpretado, esperanta → italen kaj inverse. Poste estos prezentado de diapozitivaj, filmoj ktp. Ĉu ĉio ĉi sufiĉe alloga por vi?

PROGRAMO EN TEA - JUNIO

03 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
04 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
05 - ĵaŭdo	h. 17.00 - Kurso de Esperanto
06 - vendredo	h. 20.00 - Eventuala prelego itallingva
10 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
11 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
12 - ĵaŭdo	h. 17.00 - Kurso de Esperanto
13 - vendredo	h. 20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
17 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
18 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
19 - ĵaŭdo	h. 17.00 - Kurso de Esperanto
20 - vendredo	h. 20.00 - Seminario pri interpretado
24 - mardo	h. 20.00 - Esplorado cen TEA-arkivo
25 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
26 - ĵaŭdo	h. 17.00 - Kurso de Esperanto
27 - vendredo	h. 20.00 - Ni malkovru nian Regionon (videofilmo)

Kribretante tiel kaj tiel...

Pier Giorgio Soranzo



Dua parto de la korektado de la romano MATERADA, de Fulvio Tomizza, en la esperanta traduko de d-ro Pier Giorgio Soranzo

Paĝo	Linio	Erare	Korekte	Paĝo	Linio	Erare	Korekte
68	15	ian	(forigu ian)	118	15	rimarkos	diros
69	5	disde	de	"	Lasta	robusujo	rubusujo
"	13	jugon	jungaĵon	121	21	da	por
"	15	alia	aliaj	122	25	fajfas	fajfus
"	29	malĉastulino	virino, kiu vivis en gajo kaj plezuro	"	30	estus... vere	estas... ni jam
"	33	Pereŭ	Pereu	123	6	falos...	falu en trompon, ĝuste eĉ vi
70	14	turmentita	turmentitan	"	9	en alies interesojn	fremdan vazon
"	31	normala jara festo	normalan jaran feston	"	13	trafos	trafu
"	33	komfirmacioj	konfirmacioj	124	11	sufiĉe	daŭre
72	16-17	kontrastoj	konfliktoj	125	15	pri ĉio	ĉion
77	20	frutkoj	fruktoj	126	13	nur nur	nur sur
"	21	kiel rezulto	rezulte	127	7	ankaŭ Fido	ankaŭ nia hundo Fido
78	26	ĉu ci	Kamarado, ĉu vi	"	17	la plejparto	la pliparto
80	2	donos	donus	"	26	tiel agante	dank' al tiuj forto-streĉoj
"	7	enpremito	premito	"	25	klinata	klinita
"	13	volas?"	volas"?	128	1	ĉe	al
82	Lasta	tiele	tiel	129	4	Tri Reĝoj	Epifanio
85	23	ilin malbenis	daŭre ilin malbenis	130	32	lia nomo estis Johano	la estinta Johano
88	3	elmigri	enmigri	"	27	enmigros	elmigros
90	31	elmigros	enmigros	135	26	kun kolombo	kun viando de kolombo
91	11	ankaraŭ	ankoraŭ	140	4	cidonujon	cidoniujon
"	31	kartluatadis	kartludadis	"	9	urĝas	hastas
94	1	Preterpasinte	Post kiam mi preterpasis	143	16-19	de "kiu do..." ĝis "ĉiuj"	kaj kun kiu, do, vi plej ŝatus danci? Ĉu ankaŭ kun mi? Ho, kun vi plej altgrade
96	6	klare	klara	"	20	Kaj ridetante	Ridetante kaj
"	11	implikitaj	duonfermita	144	12	ekkomencis	komencis
102	5	forviŝante	viŝante	"	27	demandate	demandante
"	8	perdinta mian kapon	malŝparinta mian tempon	145	5	problable	probable
"	9	sciis	scipovis	147	13	horuso	koruso
103	1	efikis samkiel	similis al fuĝo de	"	33	horuso	koruso
"	5	(aldoni post: urbetoj)	ĉefe tiuj apudmaraj	148	17	kampara vepro	kamparaj veproj
104	2	riamrkigi	rimarkigi	150	21	malluno	mallumo
"	7	iuj estis pretigantaj	iuj aliaj estis pretigantaj	152	5	plusadis	pulsadis
"	8	iu	aliaj	155	8	la la preĝejo	(forigu umu "la")
"	19	frato aŭ onklo loĝantaj	parencoj, kiuj povus ilin loĝigi ĉe si	156	12	kiam ajn plej fervore	plej fervore ol antaŭe
"	31	kverkoj	akacioj	158	12	tia aro da	amaso da aliaj
107	10	poste	post malmultaj tagoj	159	1	Avemaria	(forigu, ĉar en la teksto la vorto estas ŝanĝita al Anĝelus)
108	4	iu	(forigu)				
109	15	de	(forigu)				
111	13	tranĉiladoj	uzante tranĉilojn				
"	25	kiel...	se vi estus proprieto, la afero ŝanĝiĝus				
112	22	malfermita, tiel ke	malfermita: ŝajnis				
114	28	lian	liajn				
115	1	tian	tiun				
"	3	tiaj	kun siaj				
"	3	tiaj	tiuj				
118	9	kiun	kion				

8 giugno 2003 - 7° CONVEGNO INTERREGIONALE MILANESE

Programma: h.9¹⁵ raduno di fronte all'Hotel Gallia, con pullmann visita alla nuova sede del Gruppo Esp. Milanese, piccolo rinfresco, e poi trasferimento a Cesano Maderno per la visita al Palazzo Borromeo Arese. Seguirà il preanzo ed una conferenza di Davide Astori. Alle h. 16³⁰ di nuovo in pullmann per il ritorno a Milano.

Informazioni: ermigi@infinito.it; nt.giovanni@tiscalinet.it

Mallonge pri...

✓ **Mangaĵo por Irako** Kelkaj kunlaborantoj de MONATO decidis partopreni en la kolektado de mono por nutropakaĵoj por Irako. Ili estos transportitaj al la regionoj, kie la bezono estas plej granda, kunlabore kun la Tutmonda Nutriga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu liveros la mango-pakaĵojn. Kiuj volas helpi forigi malsaton inter la loĝantoj de Irako, povas pagi iun ajn sumon al FLANDRA ESPERANTO-LIGO, kiu estas la peranto. Pri pagoj al FEL rigardu en <http://www.esperanto.be/fel/fin/kielpag.html>. Por ĉiu eŭro ricevita, unu kompleta mango estos donacita.

Raportis: Paul Peeraerts esperanto@spamcop.net

✓ **Interese interrete** La kultura domo de Esperanto (Kastelo Grezijono en Boje apud Angers) malfermos sian pordon ĉi somere, kaj proponas diversgradajn staĝojn (de 28/06 ĝis 30/08).

Informoj haveblas ĉe: <http://grezijono.kastelo.free.fr>;

rete: grezijono.kastelo@free.fr;

tel/fakso: +33(0)241891034

✓ **Nova Eldonaĵo de IEI** Internacia Esperanto-Instituto ĵus lanĉis la libron VIVO DE ANDREO CSEH de Ed Borsboom. Ĉi tiu verko temas pri la vivo de Cseh kaj parte pri tiu de Julia Isbrucker. Ĝi estas ne nur la unua biografio pri la legenda pedagogo kaj dokumento pri ĉapitroj el la Esperanto-historio: la teksto entenas diversajn tiklajn epizodojn kiel pri la stokholma puĉo en UEA en la jaro 1934, la nazia malpermeso de la Internacia Lingvo en Nederlando, la agado de Connor en Usono, la ata-ita konflikto. Oni povas mendi la libron ĉe IEI kontraŭ eŭroj 18,00 + sendokostoj. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Informis Atilio Orellana Rojas - Rete: iei001@tiscali.nl

✓ **Renkontiĝaj mapoj ĉe EsperantoLand** Ekde nun la renkontiĝaj mapoj de EsperantoLand montras ankaŭ liston por la koncerna regiono laŭ la datoj. Entute videblas informoj pri ĉirkaŭ okdek estontaj renkontiĝoj el la tuta mondo ĉe www.EsperantoLand.org/renkontiĝoj. Organizantoj de renkontiĝoj povas aldoni siajn datumojn. La renkontiĝaj mapoj taŭgas por Esperanto-vojaĝantoj kaj ankaŭ por prezenti nian Esperantujon al la ekstera mondo.

Raportis: Lu Wunsch-Rolshoven - Lu@EsperantoLand.org

✓ **Ni malavare subtenu!** SABZANDISHAN estas la unua kaj ununura du-lingva Esperanto-Persa revuo en Irano. SABZANDISHAN ŝajne estas ununura Esperanta revuo en la mondo kiu disvendiĝas tra gazetar-budoj publike tra la lando! SABZANDISHAN meritas subtenon por aŭdebligi voĉon de Irana esperantistaro, enlande kaj tutmonde, kaj substrekindas la graveco de via multnombra abon-subteno! Provekzempleron oni sendos kontraŭ 5 IRK. La aeroŝta abonkotizo por unu jaro egalas al 20 eŭroj. En la gazeto oni povas legi pri arto kaj historio, pri iranaj arangoj kaj pri loka Esperanto-vivo.

Informis Reza Torabi

✓ **Esperanto-simpozio je kosto de Sveda Akademio** La Akademio de Esperanto, kunlabore kun profesoroj Sture Allen kaj Sven-Goran Malmgren de la Gotenbarga Universitato, aranĝos simpozion pri interkultura komunikado en Gotenburgo, Svedio inter la 2^a kaj 3^a de aŭgusto 2003. La simpozion apogas finance la Sveda A-

kademio, fondita en 1786 de la reĝo Gustavo la Tria. La Sveda Akademio decidas pri la ĉiujaraj Nobelpremioj pri literaturo. Laborlingvoj de la simpozio estos Esperanto kaj la angla. Tempo: 02-03 de aŭgusto. Loko: Gotenbarga Universitato, Instituto de la sveda lingvo, Renströmsgatan 6, Gotenburgo, Svedio.

Informis: Irja Kaponen Rete: esperanto@mac.com

Lingva diverseco: ĉu eĉ danĝera?

Malsekureco por aertrafikaj pasaĝeroj

La sekureco de aerpasaĝeroj parte dependas de la kapablo de la skipo doni informojn kaj facile komuniki kaze de eventuala krizo. Pro tio necesas paroli lingvon. Sed kiun lingvon? "Sur internaciaj flugoj la skipo ne ĉiam parolas la lingvojn de la du landoj inter kiuj ĝi estas fluganta. Cetere, granda elcento da pasaĝeroj - precipe la maljunuloj kaj malpli prosperaj aŭ malpli kleraj homoj - sur la aviadilo parolas nur sian denaskan lingvon," notas Sebastiano Musumeci, itala membro de la Eŭropa Parlamento. "Pro tio ili ne kapablas komuniki kun la skipo, pliigante siajn sentojn de paniko kaj izoleco kaze de eventuala krizo kaj malfaciligas, aŭ eĉ malebligas, la observon de la sekurecaj instrukcioj por la evakuo de la aviadilo."

Musumeci estas unu el multaj politikistoj, kiuj pli kaj pli konsideras, ke la manko de servoj en la gepatra lingvo konsistigas malobservon de la plej bazaj rajtoj de pasaĝeroj, la rajto je sekureco. "Kiujn paŝojn intencas la Eŭropa Komisiono preni por garantii la helpon postulitan de pasaĝeroj kiuj havas la malbonŝancon ne scipovi la lingvojn plejofte uzitajn de la flugistaro, tio estas la angla kaj la franca?" demandas Musumeci en oficiala demando (vd. sube, SKRIBA DEMANDO: P-0733/03).

Esperantisto kaj civila inĝeniero en Ĉikago, Kent Jones, jam de longa tempo pristudas la problemojn de la angla kiel aviada lingvo. La origino de multaj aviadaj incidentoj kaj akcidentoj troviĝas en la angla lingvo, kiu, kiel la anglo-saksa mezursistemo, brilas nek pro klareco, nek pro simpleco, nek pro logikeco. "Kent Jones jam entreprenis klopodojn ĉe naciaj kaj internaciaj aviadaj organizoj, por ke la demando pri aera sekureco estu pritraktata ankaŭ sub la lingvaj aspektoj" klarigas Henri Masson, redaktanto ĉe la gazetara servo de SAT-AMIKARO. Ĉar reformo de la angla montriĝis neebla, Kent Jones pristudis la uzeblecon de alia lingvo, Esperanto, kiun li konas kaj kiu estis konceptita por la lingva komunikado inter plej diverslingvaj loĝantaroj.

"Mi havas la impreson, ke oni tre malmulte akceptas la *rajton* je informo en la *propra* lingvo. Oni simple ne *ankoraŭ* havas politikon por tiuj kiuj ne scipovas la anglan," diras Dafydd ap Fergus de EŪROPA ESPERANTO-UNIO. Li ne atendas paŝojn de registaroj ĝis kiam ne estos pli da protestoj. "Indas tiurilate kontakti asociojn kiuj defendas konsumantojn, por ke ili premu ĉe la registaroj kaj flugkompanioj."

En SKRIBA DEMANDO P-0733/03 de Sebastiano Musumeci al la Eŭropa Komisiono (28 Februaro 2003), li petas respondon al la jenaj du demandoj:

"... Ĉu la Komisiono povas diri:

1. Ĉu ĝi ne konsideras, ke ĉi tiu situacio, kaŭzita de flugkompanioj, konsistigas seriozan malobservon

de la plej bazaj rajtoj de pasaĝeroj, la rajto je sekureco;

2. Kiujn paŝojn ĝi intencas preni por garantii la helpon postulitan de pasaĝeroj kiuj havas la malbonŝancon ne scipovi la lingvojn plejofte uzitajn de la flugistaro, tio estas la angla kaj la franca?"

Interesiĝantoj pri interkomunikado en aviada kampo pere de esperanto povas ricevi la libron AVIADA TERMINARO, de Kent Jones kaj Gersi Alfredo Bays, de la eldonejo FONTO. Temas pri 288-paĝa verko konsistanta el 1000 terminoj, 23 ilustraj platoj, aeronautika vortaro angla-Esperanta kun 4000 esprimoj en 13 laŭtemaj ĉapitroj kaj BAZA AVIADA FRAZEOLOGIO. La distribuanto de tiu libro estas Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, BR-70084-970-Brasilia-DF, Brazilio. Prezo: 15 eŭroj.

Demando al komisaro Verheugen pri Eŭropa lingvo

La 7^{an} de marto 2003 gatis en Maribor, Slovenio, komisaro por larĝigo de EU Gunter Verheugen, kiu kun slovena ministro Janez Potočnik ĉefrolis en publika tribuno pri EU. Zlatko Tišljar, sekretario de Asocio por Eŭropa Koscio, starigis du demandojn al la komisaro:

"Kial EU ne analizis evoluon de lingva politiko en Eksjugoslavio kaj Sovetunio por eviti erarigojn de tiuj landoj kaj kial EU-politikistoj kapitulacis sub la premo de EUBurokroj kaj klopodas enkonduki la anglan lingvon?" Tišljar krome menciis, ke necesas evoluigi eŭropan identecon per neŭtrala lingvo kia la latina aŭ esperanto.

Respondoj de Verheugen

Al la demandoj de Tišljar la komisaro Verheugen respondis, ke EU ne estas komparebla kun Sovetunio kaj Eksjugoslavio kaj ke ĝi ne estas ŝtato. Krome ke en EU ĉiuj lingvoj estas egalrajtaj kaj ke oni devas zorgi pri konservo de naciaj lingvoj. "La lingvo ne estas nur kulturo, sed ankaŭ nia naturo!" Z. Tišljar donacis al li la libron "Eŭropa identeco" en la germana. En posta interparolo kun ministro Potočnik, tiu ĉi diris, ke li bone komprenis la demandojn, sed ke publiko kutime negative reagis al ĉiu ideo pri komuna eŭropa lingvo. Tial politikistoj ne ŝatas subteni ĝin.

Raportis: Zlatko Tišljar zlatko.tisljar@siol.net

Dichiarazione dell'UEA

in occasione della giornata del libro - 23 aprile 2003

L'Associazione Mondiale dell'Esperanto aderisce alla celebrazione della giornata internazionale del libro indetta dall'UNESCO. Scopi della giornata sono quelli di indurre a leggere libri, ad organizzare mostre e a proteggere i diritti degli autori. Noi sosteniamo integralmente la dichiarazione del Direttore Generale dell'Unesco, Koïchiro Matsuura, in occasione della giornata del libro dello scorso anno, quando egli disse che "I libri sono una fondamentale risorsa per appropriarsi dei valori della saggezza, della bellezza e del pensiero umano. In quanto veicoli di trasporto della creatività, dell'informazione e dell'educazione, essi permettono ad ogni cultura di esprimere le sue caratteristiche essenziali e di riconoscere l'identità delle altre. In quanto finestra sulla diversità delle culture e ponte fra civiltà, al di là dello spazio e del tempo, i libri sono fonte di dialogo, mezzo di scambio e fonte di evoluzione."

C'è però qualcosa di specifico nella cultura espressa dalla produzione libraria in esperanto. Si tratta del fatto che, effettivamente, la comunità esperantofona prova fortemente a realizzare l'aspirazione di ogni popolo ad esprimere le sue caratteristiche e a comprendere l'identità delle altre genti. La produzione libraria in lingua esperanto mette concretamente tutti i popoli sullo stesso livello, in quanto a possibilità di espressione, a prescindere dalla loro grandezza numerica, economica o politica. Ciò è ancor più importante al giorno d'oggi quando taluni possono utilizzare i loro libri anche come mezzo di imperialismo culturale. Basta guardare le statistiche della stessa UNESCO, circa il paese d'origine dei libri venduti, per comprendere la vastità del fenomeno. Contemporaneamente le statistiche sulla traduzione di libri mostrano ancor più drammaticamente che l'influsso culturale del mondo attuale è solo a senso unico: taluni parlano a tutti e tutti ascoltano.

Contro ciò e per l'uguaglianza fra le lingue, le culture e i popoli, il movimento esperantista ha lavorato per un secolo e riafferma con fierezza i suoi scopi originali. L'esperanto, lingua internazionale pianificata, mira alla giustizia nel campo delle relazioni internazionali linguistiche e culturali. Il sostegno ai libri stampati in ogni paese, in ogni lingua ed il sostegno ai valori espressi in essi è, dunque, elemento connesso ai nostri scopi e per questo noi partecipiamo alle iniziative dell'UNESCO per un mondo più giusto, anche in questo campo.

L'ASSOCIAZIONE MONDIALE DELL'ESPERANTO



Solvo de la kvizo aperinta en la marta TEA-Bulteno

1. En kiu jaro aperis la unua PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO (PIV)
B) 1970
2. Kion signifas la mallongigo TAKE?
A) Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
3. En kiu lando aperis, en 1925, la unua Esperanto-poŝtmarko?
B) Sovetio

Ĉi foje la redakcio estas tre feliĉa, ĉar finfine la Kvizo havis plurajn konkursantojn, kiuj respondis korekte al la demandoj. Bedaŭrinde nur unu estas la premio, kaj do, nur unu la premiito. Memkompreneble estis elektita serioza komisiono, el plurkapa membraro, inter kiuj estis lote elektita la persono kiu lote aljuĝis la premion, konsistantan el du interesaj libroj, al

Pier Giorgio Soranzo

Gratulojn al la gajninto kaj ... ek al la solvo de la nuna

Kvizo!

- 1) Kiujn lingvojn parolis hejme L.L. Zamenhof?
A) Pola kaj rusa B) Jida kaj rusa C) Germana kaj rusa
- 2) En kiu monato kaj jaro estis fondita UEA?
A) julio 1905 B) marto 1912 C) aprilo 1908
- 3) Kiu skribis la libron „Virino ĉe la landlimo“?
A) John Wells B) Marjorie Boulton C) William Auld

Inform-artikoloj ŝuldeblas al RET-INFO, NUN KAJ NOVA SENTO.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via del Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it, nored@estelnet.it

http://arte.triesteincontra.it/esperanto

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Postĉekkonto N° 10834349